FENIKSO NIGRA

# ANARKIO

INFORMA MONATA BULTENO
JUNIO 2011
Nº 10

## La Ŝtato



En angulo de ĉiu liberecana meso kuŝas, kvazaŭ terura monstro, la nepre detruenda ŝtato, kaŭzo de ĉiuj malbonoj pasintaj, nunaj kaj ve, estontaj !... Sed fakte kiel konkrete manifestiĝas la bestaĉo ? Preskaŭ ekskluzive per trudoj kontraŭ la individuo, kompense al tiom malmultaj "rajtoj" ! Almenaŭ tiel opinias la liberecanoj...

Vi naskiĝas. Tuj endas vin registri. Kaj jen la komenco de la ŝtata entrudiĝo. Sekvas vakcinoj, sankontroloj, deviga instruado, ktp... Sekvas por iuj soldatservo, dungiĝo por panakiro (... aŭ denove registriĝo por ke vi, se senlabora, ricevu helpon...). Sed ni ne tro nigrigu la bildon ; jen la ĝojiga partoprenoj en balotoj, en impostpagado (kio ja pruvas, ke finfine vi trovis mondonan okupon)...

Kiel do elturniĝu vi, liberecano, implikita en tiu araneaĵo, kies gardisto gvatas, vorante la malfortulojn, grasigante la plej potencajn ? Relative multaj gekompanoj iam baraktis kontraŭ devigaj vakcinadoj, radiografiadoj, provis por siaj infanoj liberecanajn pedagogiojn... Iuj sukcesis ne soldatservi, sed je kia kosto ! Sed en nia ekonomia sistemo, kiel evitos la salajratan sklavecon, alie ol per almozpetado, se vi rifuzos la ŝtatan kontroladon ? Aŭ eble vi kredas je individua aŭtaracio ? Rakontu al ni...

Ĝenerale interkonsentas la diversaj liberecanoj, ke voĉdoni kadre de "burĝa demokratio" estas nepre evitenda perfido al la idealo ; Ni almenaŭ ne tiel kontribuu al la propra sklaveco ! Sed interese estus scii, kiel reagas liberecanoj en landoj, kie voĉdonado estas deviga, ekz. Belgio kaj Luksemburgio...

Ĉu ekzistas rimedoj por ne pagi impostojn ? Jes ja : neniom enspezi, nenion posedi, aŭ - vi divenis ! - fraŭdi.

Kompreneble, se vin priŝtelas, atakas gangstero aŭ ankoraŭ pli malriĉa eksterleĝulo, kiel vi reagos ? Ĉu plorĝemante en ĝendarmejo, skribe plendante al la taŭga instanco ? Aŭ ĉu vi pafe solvos mem la problemon - inter individuoj ? Ha, foje, kiel malfacilas esti liberecano !!!

---



## Anarkismo

Kontraŭstaro al la ŝtato kaj al hierarĥio havas longan historion antaŭ la eŭropanaj anarkiistoj de la 19-a jarcento. Iuj pretendas, ke anarkiismaj temoj troviĝas en la verkoj de la Taoista saĝulo Laozio. Diogeno kaj la cinikuloj kaj ilia samtempulo, Zenono el Kitiono, la fondinto de Stoikismo, ankaŭ prezentis similajn temojn.

Moderna anarkiismo, tamen, floris el la sekulara pensado de la klerisma epoko, precipe el la argumentoj de Jean-Jacques Rousseau por morala centreco de libereco. "Anarkiismo" komenciĝis kiel termino de abuzo, sed ekde la Franca Revolucio, iuj (ekzemple la Enragés aŭ Kolereguloj) ekuzis la terminon pozitive, konsiderante la "revolucian registaron" de la Jakobenoj sinkontraŭdira. El tiu ĉi klimato William Godwin evoluigis tion, kion multaj homoj konsideras la unuan esprimon de moderna anarkiisma pensado. Godwin estis, laŭ Petro Kropotkin, "la unua homo kiu formulis la politikajn kaj ekonomiajn komprenaĵojn de anarkiismo, kvankam li ne donis tiun nomon al la ideoj evoluigitaj en siaj verkoj." Godwin, filozofia anarkiisto, kontraŭstaris revolucian agadon kaj vidis minimuman ŝtaton kiel modernan "necesan malbonon" kiu estiĝus pli kaj pli nebezonata kaj senpotenca laŭ la iompostioma evoluo de scio. Godwin porpledis ekstreman individuismon, proponante ke ĉiu

kunlaborado ĉesu. Godwin sintenis, ke diskriminacio pro iuj ajn kialoj krom kapablo netolereblis.

La unua homo kiu sin priskribis kiel anarkiisto estis Pierre-Joseph Proudhon, kaj pro tio iuj nomas lin la fondinto de moderna anarkiisma teorio. Proudhon proponis spontanean ordon, per kio organizo aperas sen centra aŭtoritato, "pozitivan anarkiismon" en kiu ordo aperas kiam ĉiu faras "tion kion li deziras kaj nur kion li deziras" kaj kie "nur komercaj transakcioj produktas la socian ordon." Kiel Godwin, Proudhon kontraŭstaris perfortan revolucian agadon. Li vidis anarkion kiel "formon de registaro aŭ konstitucio en kiu publika kaj nepublika konscio, formita de la evoluigo de scienco kaj leĝo, estas sole sufiĉa por konservi ordon kaj por garantii ĉiujn liberecojn. En ĝi, konsekvence, la institucio de la polico, preventaj kaj restriktaj metodoj, oficialeco, impostado, ktp., estas reduktitaj al minimumo. En ĝi, pli precipe, la formoj de monarkio kaj intensa centrigo malaperas, anstataŭigitaj de federalaj institucioj kaj vivŝablono bazita sur la komunumo."

## Esperanto kaj anarkismo

Anarkiistoj estis inter la pioniroj de la disvastigo de Esperanto. En 1905 fondiĝis en Stokholmo la unua anarkiisma Esperanto-grupo. Sekvis multaj aliaj: en Bulgario, Ĉinio kaj aliaj landoj. Anarkiistoj kaj anarki-sindikatistoj, kiuj antaŭ la Unua Mondmilito apartenis al la nombre plej granda grupo inter la proletaj esperantistoj, fondis en 1906 la internacian ligon Paco-Libereco, kiu eldonis la gazeton Internacia Socia Revuo. Paco-libereco unuiĝis en 1910 kun alia progresema asocio, Esperantista Laboristaro. La komuna organizaĵo nomiĝis Liberiga Stelo. Ĝis 1914 tiu organizaĵo eldonis multe da revolucia literaturo en Esperanto, interalie ankaŭ anarkiisma. Tial povis evolui en la jaroj antaŭ la Unua Mondmilito ekzemple vigla korespondado inter eŭropaj kaj japanaj anarkiistoj. En 1907 la internacia anarkiisma kongreso en Amsterdamo faris rezolucion pri la afero de internacia lingvo, kaj venis dum la postaj jaroj similaj kongresaj rezolucioj. Esperantistoj, kiuj partoprenis tiujn kongresojn, okupiĝis precipe pri la internaciaj rilatoj de la anarkiistoj.

En marto de 1925, "Berlina Grupo de Anarki-Sindikatismaj Esperantistoj" salutis la en Amsterdamo okazantan 2-an Kongreson de la Internacia Laborista Asocio (ILA). Ĝi parolis pri tio, ke Esperanto en la vicoj de la germana ILA-sekcio FAUD "jam tiugrade enradikiĝis, ke ĝi nun fondis mondan organizaĵon de esperantistoj sur liberecana-kontraŭaŭtoritatisma fundamento". Tio estas verŝajne aludo pri T.L.E.S. (Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj), kiu fondiĝis en la 1920-aj jaroj, ĉar SAT en la komenco estis forte sub komunisma influo. Ŝajnas, ke T.L.E.S. pli poste enfandiĝis en SAT.

Daŭrigas en Anarkio 11

## La celoj de ATEO
## Ateista Tutmonda Esperantista-Organizo



1-Kunligi Esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.

2-Disvastigi Esperanton inter ateistoj.

3-Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.

4-Insistigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj oni varbas ĉe religiaj grupoj.

5-Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.

6-LIbere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.

7-Malkateni la mensojn!



## Ni bezonas voluntulojn!

Nia iniciatemo bezonas voluntulojn por skribi, traduki, desegni aŭ por iu ajn kontribuaĵo.
Ĉia helpo estas bonvenan, dankon!
Sanon kaj anarkion!

**Kontaktojn**
Fenikso Nigra
CP: 999 - CEP 13001-970 Campinaso - San-Paŭlio
Aŭ
CP: 5005 - 130036-970 Campinas0 - San-Paŭlio
m.e.: fenikso@anarkio.net m.e.: fenikso@riseup.net
http://anarkio.net

anarkio kaj esperanto